

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

10-a jarkolekto

N-ro 2, 1980

Edistudio, Pizo, Italujo

ENHAVO

Paŭlo Iacci — Johano Tadolini — <i>La sociigo de la dulingva infano kaj la rilatoj inter la interagado en la familia dinamiko kaj la ekstera soci-kultura medio</i>	25
Irja Klemola — <i>Gepatra lingvo, fremdaj lingvoj kaj matematiko en la studplano de deviga lernejo</i>	30
Helmut Sonnabend — <i>Esperanto: lerneja eksperimento</i>	32
Lucia Wald — <i>Rimarkoj pri la rilato inter la historio de la lingvo kaj de la socio</i>	35
Ioana Priotesa — <i>Nuntempa vidpunkto koncerne la artefaritajn lingvojn</i>	35
Constantin Dominte — <i>Rimarkoj pri la lingvaj baroj en la poezia traduko</i>	36
Julius Balbin — <i>Loglan</i>	36
David Gold — <i>Studo pri ebla influo de Jida kaj Hebrea lingvoj je Esperanto</i>	37
Hermann Behrmann — <i>La kohera strukturo de la Esperanto-gramatiko kaj minimala vortrezoro por la lingvo-orientiga instruado</i>	38
István Szerdahelyi — <i>La historio kaj nuna stato de interlingvistika kaj esperantologia universitata instruado kaj scienca esploro en Hungario</i>	38
Árpád Rátkai — <i>Fruaj socialismaj konceptoj pri la lingva futuro de la homaro</i>	40
Jaromír Jermář — <i>Etnaj problemoj kaj interlingvistiko</i>	41
Kiel leciono instrui la ĉarman poemon "Panjo Anaso"?	42
D-ro Mario Dazzini — <i>Preparkerferenco al nova serio de kunordigaj konferencoj en Maribor</i>	43
Sciigoj, raportoj	44
Korespondi deziras	47
Leteroj	48

La sociigo de la dulingva infano kaj la rilatoj inter la interagado en la familia dinamiko kaj la ekstera soci-kultura medio.

Paŭlo Iacci — Johano Tadolini

Per ĉi tiu eseo ni celas prezenti materialon taŭgan por kelkaj pripensoj pri la psiko-rilataj problemoj ĉe la dulingva infano.

Ĝian temon konsistigas la rezultoj de serio da intervjuoj efektivigitaj ĉe dulingvaj familioj loĝantaj en Aŭstrio, kaj ĉe italaj familioj unulingvaj tien translokiĝintaj.

Oni klopodis esplori la manierojn per kiuj la dulingva infano sociiĝas kaj la rilatojn inter la interagado en la familia dinamiko kaj la ekstera soci-kultura medio.

Hipoteza deirpunkto sugestas eblan konfliktemon dum la sociigaj fazoj de la infano en rilato kun la dinamiko de la familia interagado, laŭ la diversnacieco de la patro aŭ de la patrino; laŭ la valoroj kiujn la du geedzoj persone reprezentas en rilato kun la dinamiko de tiuj valoroj socie akceptitaj, k.t.p. Konsideroj pri ĉi tiuj temoj ekakiras apartan gravecon hodiaŭ, en la momento kiam la forfaligo de la soci-ekonomiaj baroj, kaj espereble ankaŭ de tiuj lingvaj, ŝajnas fariĝi iom-post-ioma, laŭgrada realaĵo.

La aparta situacio de unu el la membroj aŭ de la tuta familio kiu "sin-eksterlasas" sammomente kun la malapero de la komunikebleco de unu el la du lingvoj, povas ekstartigi "reven-mehanisman" (*feed back*), estigante en la dinamiko de la familiaj ekvilibroj, situacion de nesaniĝebla konfliktemeco.

Komprenibile ni ne priskribos ĉiujn kazojn esploritajn sed ni limigos nian priskribon je du el ili, kiuj ŝajnis bone resumi la ĉefajn elementojn eltiritajn el ĉiuj aliaj kaj kies trajtoj konsistigas ĝeneraligitan tipan ekzemplon. Ĉe la unua la tuta familia medio estas dulingva: la gepatroj estas diverslandanoj, ne konas la reciprokajn lingvojn, do iliaj lingvaj kodoj diferencas. La dua kazo rilatas "translokiĝ-familion" (elmigradon de unulingva familia grupo kun ankoraŭ etaj filoj).

Ĉe pluraj esploroj jam aperintaj pri tiu ĉi kampo, la plej komuna eraro farita montriĝas la analizado de la problemoj pri la lingvo-lernado konsiderante la koncernan medion kiel "homogena tutaĵo", nome apartigante la dulingvan familion de la diversaj sociaj, kulturaj, ekonomiaj faktoroj: ne konsiderante ĉi tiujn variantojn eke de la momento dum kiu la infaneto elportas, suferas la "politikajn" elektojn de siaj gepatroj pri la familia uzado de la du lingvoj; alivorte eke de la unuaj fazoj de la intelekta akirado.

Necesas konsideri ke plurfoje la ĉirkaŭanta medio premas sur la familion por ke ĝi elektu la lingvon. En la okazo de familio kun gepatroj je malsama lingva kodo, la

efektiva alprenado flanke de la infano de la du lingvoj de la familio dependas ankaŭ de la kondiĉoj de la generinta "fremdmulo", kiuj povas varii de plena integriĝo kaj akcepto flanke de la gastiganta medio ĝis formoj de eksterlasado kaj antaŭjuĝo, kiuj provizorigas kaj kontraŭecigas la rilatojn kun la familia kaj ekster-familia medioj.

La unua familia strukturo ekzamenita en Aŭstrio ampleksis italan enmigrinton, la patron, kaj aŭstrian loĝantaron, la patrinon. Pliaj esploroj faritaj ĉe dekoj da samaj familiaj grupoj konfirmis la ĉefajn donitaĵojn eltiritajn.

Unu el la plej elstaraj motivoj de streĉo ĉe tiuj familioj montriĝis la grado de komunik-ebleco. La lernado de la germana por la enmigrintoj, precipe manlaboristoj, ĉiam estigis grandajn malfacilaĵojn kaj ofte ĝi limiĝas per la nura utiligado de tiuj vortoj necesaj al la plenumata laboro. Do oni rimarkis ke ĝenerale dum la unuaj geedziĝaj periodoj, la patro utiligas lingvon (germanan) tre malriĉan je vortoj, ofte fortorditaj, malfaciligante la eblecojn de reciproka interkompreno.

Ĝuste dum ĉi tiuj periodoj okazas ke sintenoj aŭ vortoj, malbone interpretitaj, povas ekflamigi neatenditajn kaj agresemajn reagojn. Tiele pluraj bonanimaj ekkrioj povas fariĝi insultoj: la ĵargonon, ne nur idiomon, propran de ĉiu ajn medio oni lernas komplete en ĝia spirito per multe pli da penado ol tiu postulata de la kutime parolata lingvo.

Certe iom-post-ioma integriĝo kuntrenas plej akcentitajn motivojn kaj faciligojn en la lernado de la lingvo, sed fakte la enmigrinta stato kun ĝia koncerna marĝenuligo, la fortaj antaŭjuĝoj kaj la malfacila kunvivado de la du kulturoj, de la du diferencaj "Weltanschauung" (= mondrigardoj) ne ĉesas.

De la plenumata analizo oni rimarkis la eblecon interrilatigi kelkajn tipajn dinamikojn kaj kelkajn tipajn interpretadojn de diferencigitaj valoroj en la du koncernaj kulturoj. Ĉe la itala mentaleco la roloj viro-virino kaj patro-patrina tre malsamas rilate al tiuj ĉe la aŭstria pensmaniero. En Aŭstrio ĝenerale, la patro fakte konfidas al sia edzino la plenumon de ĉiu familia decido kaj la evoluon de la rilatoj kun la lernejo, la institucioj kaj la socia grupo. Ĉi tiun fakton la itala patro travivas kiel vaniga reduktigo de sia propra rolo kun facile imageblaj implikaĵoj en la grado de sociigo de l' filo kaj en liaj lingvaj esprimiĝoj. Ĝenerale diversaj montriĝas la interpretadoj de la konceptoj de "sinofero", de "respondeco", de "fideleco", de "sekseco" k.t.p.

Tiel okazas ke la patro "fremda" plejofte ne kontentigas la perspektivojn esperatajn de la edzina familio. Tamen la influo de la parenca familio tre gravas ĉar ĝi plurfoje reprezentas la solan momenton de perado kun kia ajn socia kontakto ekster-labora. La aŭstria parenca familio kaj la ekstera medio daŭre konsideras eksternormaj certajn sintenojn de la itala patro, radikaligante tutan serion da kulturaj antaŭjuĝoj jam antaŭe ekzistantaj. Cetere la virino konservas la rilatojn kun sia propra familio kaj kun sia propra medio, el kiuj ŝi ricevas apogon en konfliktaj situacioj, dum la edzo, kiu sentas sin izolita, emas reagi per neĝusta maniero, ĝenerale agresema, al kiu ajn problemoj. Tiajn reagojn plejofte oni interpretas kiel tipaj de la devena soci-kultura grupo.

Kiam la filoj, eĉ nur hazarde, montriĝas agresemaj, oni tuj parolas pri heredecaj faktoroj.

Oni ankaŭ devas konsideri ke plurfoje la kultura nivelo de la itala patro estas mal-supera de tiu de la patrino, tiele pliiĝante lian staton de senutileco kaj senpoveco. Kiam la patro ne kontentigas la perspektivojn de la edzino kaj/aŭ de la ekstera medio, ankaŭ la filoj restas seniluziigitaj ĉar ili aliĝas al la valor-skalo socie akceptita kaj formita per la informoj eltiritaj el la patrino kaj el la parenca medio, pere de la sama lingvo utiligita dum la ludado kaj en la lernejo.

Oni rimarkis ke plurfoje la medio de la plenkreskuloj, grava por la infano, faciligas la ostracismon kontraŭ la itala socia grupo, malhelpante ne nur la socian maturiĝon de l' filo, sed ankaŭ la rilatojn kun lia patro; konsekvence bremsante lian lernokapablon de la dua lingvo. Kelkfoje, je limesa okazo, tio estigis precizan kaj radikalman malinklinon kontraŭ ĉio kio estas itala. Ĉio ĉi povas ŝajni paradoksa en familio dulingva, ĝuste taksata kiel medio favora al procezo de socia maturiĝo de l' infano, kompare kun aliaj grupoj. Des pli ke ne mankas tensiigaj faktoroj diversspecaj, ĉu en la interno, ĉu ekstere de la familio: precipe la antaŭjuĝo, maturigita tra la aliaj infanoj, estas daŭra konfliktiga motivo kiu pli malfaciligas la sociigon de la ekzamenitaj subjektoj kaj ilian kapablon akiri la "fremdan" lingvon. Krom tio, la pli alta kultura nivelo de la patrino, la fakto ke ŝi ne permesas ke aliaj ne apartenantaj al ekstera medio kunlaboru en la edukado de la filoj, ofte devigas la patron konformigi sian sintenon al sociaj perspektivoj mem eligante sin, kiel italon, el la ĉirkaŭa medio eĉ ne parolante plu itale kun siaj filoj. En ĉi tiuj kondiĉoj la socia medio kaj la familio jam decidis pri la direkto de l' evoluo psiko-lingva de la infano.

Kompreneble la soci-kultur-ekonomia nivelo de la patro povas konsistigi tre gravan varianton: se ekzemple li estas universitata diplomito, pli facile montriĝos lia persona integriĝo kaj la ebleco kontroli la rilatecajn dinamikojn. Eĉ la alirrajto al medioj kaj al pli altnivela lernejo pro siaj filoj fariĝos afero pli pritraktebla. Tiam la kultura kaj lingva helpo de la institucia lernejo plimildigas la penojn de la integriĝo de la knabo, kiu tiele sukcesas multe pli facile progresi survoje al diversaj kulturmodeloj kaj atingi bonan gradon de lingva scipovo. El tio ĉi venas la neceseco de la funkcio de la internaciaj lernejoj kiuj povas ludi fundamentan rolon ne nur el strikte didaktika vidpunkto sed pli ĝenerale en la proceso de sociigo de la dulingva infano.

Ni opinias ĉirilate ke la akiro de neŭtrala lingvo, kiel ekzemple Esperanto, povus eĉ prezenti terapeŭtikan signifon precipe ĉe tiuj medioj en kiuj dulingvismo fariĝas kaŭzo de marĝenuligo kaj pro tio de malfruo en la intelekta evoluado kaj en la atingo de persona identeco.

La dua familia strukturo ekzamenita ampleksis italan patrinon kaj aŭstrian patron. Ĉi tiu dua ekzemplo prezentas kelkajn diferencojn kompare kun la unua, precipe pro la elstara rolo de la patrino en la edukado de la filoj. La parenca medio ĝenerale ne "interferas" en ŝia patrina agado, tiele kreditigante al ŝi ian aŭtoritatecon kaj aŭtonomecon. Krom tio oni devas rimarki ke tiaj geedziĝoj okazas ĉe medioj sufiĉe altnivela laŭ la soci-ekonomia vidpunkto.

Estas malfacile ke itala virino elmigru por serĉi laboron: kutime okazas ke la edzoj kiuj jam havas rilatojn, plejofte komercajn, kun Italujo, kaj pro tio konas la italajn medion kaj mentalecon krom almenaŭ la rudimentoj de la itala lingvo, venigas italinon al sia hejmo. Ĉi riuj kondiĉoj aspektas pli favoraj al akcepto de la “fremda” edzino fare de la medio, parenca aŭ ne.

Ĉio ĉi kuntrenas pli bonajn kondiĉojn por ke, dum la sociiga procezo, la infano pli intense kontaktu la italajn kulturon kaj lingvon. Eĉ se la aŭstria lingvo kaj kulturo posedas “dominantajn” karakterizaĵojn, sekve de ĝiaj sociigaj faktoroj kiel la lernejo, la “mass-media” k.a., la knaboj preskaŭ ĉiam scipovas sufiĉe bone la italan, tiel ke ili sukcesas utiligi ĝin kiam alparolanto esprimiĝas per ĉi tiu lingvo. Ĉi tiuj apartaj kondiĉoj permesas malpliigi ĝis minimumo la konfliktajn faktorojn en la interno de la du kulturoj, tiel ke dukulturismo kaj sekve dulingvismo je preskaŭ perfekta nivelo eblas.

Translokiĝa familio

La fenomenoj de ebla konfliktemo prezentas apartan gravecon kiam la kulturoj de la familia medio kaj tiu de la ekster-familia ĉirkaŭo estas “fremdaj”, kiel okazas kiam itala familio elmigras al Aŭstrio. Ĉiokaza oni rimarkis inklinon al daŭrigo de la modalecoj de l'interrilatoj kontraste kun la nova medio, per la klopodo ne perdi ian identecon, antaŭvidante ja eblan revenon al origina patrujo. Pro tio plurfoje kutimoj kaj moroj de sia propra kulturo, taksita kiel konflikteca kompare kun tiu loka, radikaligās.

La italaj gepatroj, precipe la patrino, malfacile klopodas akiri la germanan lingvon: do la filoj, tute aparte post la unuaj lernoĵaroj, estante membroj de ambaŭ grupoj fariĝas perforte ĝiaj perantoj. Sekve de tio la aparteno al kultura itala familia spaco, povas eĉ esti perceptata kiel devo. Tamen kelkfoje okazas ĝuste la malo: la familioj ŝajnas eĉ tro sopiraj al forlaso de la devenaj tradicioj kaj trude influas la filojn por ke ili integriĝu al nova ĉirkaŭo. Krom tio, la rapideco de kunfandiĝo en la novan kulturon povas esti malekvilibrojn en la interno de la familio.

La filoj lernas pli rapide ol la gepatroj, la patro pli ol la patrino, la malpliĝaj filoj pli ol tiuj pliaĝaj. Tiuj situacioj povas kelkfoje kuntreni la rifuzon fare de la filoj al siaj gepatroj, al ilia aŭtoritato, al iliaj modaloj kaj eĉ al ilia lingva kodo.

Ĉio ĉi povas esti malsekurecon, senton de senrealeco kaj de aliformiĝo ĝis psikoza formoj kiel ekzemple persekut-manio kaj nekapableco objektivite esplori sin mem kaj siajn proprajn problemojn.

Do ĉi tiuj kulturaj konfliktoj povas manifestiĝi kiel mensaj konfliktoj. Tiel en la familio de elmigrintoj povas okazi disiga procezo ligita al precisaj konflikta faktoroj: ĉi tio - kiel jam menciite - estigas la rifuzon de la infano al rolo de siaj gepatroj kaj al iliaj kulturaj valoroj, inter kiuj la lingva kodo elstaras.

Notinda estas la fakto ke la konfliktecaj faktoroj trovas sian grundon ĝuste en la ĉefaj institucioj: ekzemple la aŭstria lernejo emas selekti kaj marĝenumi la filojn de la enmigrintoj, sin pravigante per ilia malsufiĉa esprimkapablo kaj atribuan al devena soci-kultura medio ilian eblan agresemecon kiel tipan sintenadon.

Kompreneble ĉi tio ne okazas nur ĉe la eduka sistemo aŭstria sed kontraŭe ŝajnas konstanto de ĉiuj institucioj kiuj ankoraŭ agas laŭ malvasta optiko je la vidpunkto kultura kaj sekve ankaŭ lingva. Dulingviŝmo povus montriĝi bonega riĉigilo de la homa personeco sed ankaŭ povas fariĝi atestaĵo de profunda antagonismo; kiu precize manifestiĝas ankaŭ per lingva konfliktemeco. Certe la malfacilaĵoj ne naskiĝas senpere de la individua dulingvismo, sed de la eksteraj kondiĉoj en kiuj povas troviĝi familioj dulingvaj aŭ enmigrintaj.

La eblecoj pri intelekta kaj afekcia senbareco je dispono de la dulingvismo je niveloj socia, kultura, literatura, politika k.t.p., ĝenerale elvolvas ĉe li pli riĉan kaj ekvilibran personecon. Sed tio okazas nur kiam reale ne ekzistas sintenoj esceptantaj kiajn ajn lingvo kaj kulturo. Cetere ŝajnas oportune senmitigi la perfektan dulingvismon por pli realece esplori la akir-procezon de la du lingvoj: la serĉado de la streĉigaj faktoroj devas konsistigi la bazon kaj la ĝustatempan momenton por ke la oficialaj instancoj, kiel ekzemple la lernejo, sin intermetu kaj kunhelpu.

Finfine ni faru kelkajn konsiderojn pri la familioj, verdire ankoraŭ malmultaj laŭ nombra vidpunkto, sed certe en daŭra progresado, ĉe kiuj la hejma lingvo estas nek tiu devena de la patro nek tiu de la patrino.

Signifoplenan ekzemplon prezentas tiuj familioj en kiuj la geedzoj utiligas Esperanton kiel ĉefan komunikilon, pro tio ke ili interkonatiĝis, ekzemple, dum internaciaj esperanto-kongresoj.

Kvankam ankaŭ en ĉi tiu kazo la supre skizita diskurso pri la soci-kulturaj variantoj restas valora, ni rimarkigas ke la infano povas intelekte evolui en neŭtrala kaj ekvibrata medio, en kiu la rilatoj de interkomunikado kun ambaŭ gepatroj restas egaldistancaj kaj saminterspacaj. Je ĉi tiu nivelo ni ne posedas sufiĉajn donitaĵojn por esplori ĉispecajn rilatojn de la infanoj kun la ekstera ĉirkaŭo, kiuj kiel ajn evoluas kaj aliformiĝas laŭ ampleksaj direktoj, sed ni havas motivon opinii ke la afekcia sekureco proponita de la komunik-ebleco kun ambaŭ gepatraj figuroj — pere de neŭtrale homa, interfratiga kaj per si mem edukvalora interkomprenilo kiel Esperanto — povas serene knedi kaj tre pozitive influi la infanan personecon, donante al ĝi pli vastan kapablecon alfronti eksteran ĉirkaŭon lingve kaj socie malamikan.

Gepatra lingvo, fremdaj lingvoj kaj matematiko en la studplano de deviga lernejo.

Irja Klemola

La finna sekcio de ILEI sendis al reprezentantoj de ILEI aŭ aliaj kompetentuloj 50 cirkulerojn. La celo de la letero estis ricevi informojn pri la pozicio de la gepatra lingvo, fremdaj lingvoj kaj matematiko en la studplano de lernejoj korelativaj al la firma baza lernejo. Entute venis respondoj el 44 landoj, tri respondoj ne donis petitajn informojn kaj ses landoj ne respondis.

Tia unueca lerneja sistemo kiel en Finnlando ne ekzistas en aliaj landoj, studplanoj povas en apartaj partoj de lando esti diversaj, ŝanĝoj povas esti okazintaj aŭ ĝuste okazas. Sed la statistiko tamen donas klaran bildon pri la pozicio de la menciitaj fakoj en la instruprogramejo.

En la respondoj venintaj el kelkaj landoj estas Esperanto menciita kiel lingvo, kiun oni povas instrui aŭ jam en lernejoj (Brazilio, Estonio, Anglio, Italio, Aŭstrio, Federacia Respubliko Germanio, Norvegio, Svedio, Hungario). (Ne estis petitaj informoj pri la instruado de Esperanto).

La ĉemetita tabelo kun sia aldono prezentas la rezulton de la cirkulero.

La pozicio de la gepatra lingvo, fremdaj lingvoj kaj matematiko estas diskutata en Finnlando inter instruistoj, en gazetaro, ankaŭ en hejmoj. Laborgrupo starigita de Edukministerio preparas novan programon por lingvoinstruado en la deviga lernejo kaj liceoj.

La lingva problemo estas universala. Ĝi estas konstatata ĉie en la internacia agado kaj kunlaboro. Plej malfacile ĝi estas en la rondo de la nacioj, kiuj ne apartenas al la hindoeŭropa lingvogrupo, ĉe ni krome la geopolitika pozicio de nia lando malfaciligas la problemon.

La rezulto de la enketo donas, kiel ĝuste tia kia ĝi estas, motivaĵon por pliprecizigoj de opinioj kaj konkludoj.

Konvinkite pri la grava signifo de la gepatra lingvo en la instruado ĝenerale kaj kiel bazo de la nacia kulturo kaj ankaŭ pri la neceseco de la Internacia Lingvo.

Konciza resumo pri la enhavo de la statistiko

1. Meznombraj ciferoj pri la semajnaj lecionoj:

			a	b
la gepatra lingvo	59,1	en Finnlando*	43,5	45
la devigaj fremdaj lingvoj sume	19,0	”	25,5	25
matematiko	44,1	”	30,5	36

(esceptaj ciferoj ne estas enkalkulitaj)

2.	La unua kaj la dua lingvoj devigaj	en 19 landoj
	Ne ekzistas dua fremda lingvo	en 9 landoj
	La dua lingvo libervola	en 9 landoj
	Ĉiuj fremdaj lingvoj libervolaj	en 3 landoj
	Ne fremdaj lingvoj	en 1 landoj

Entute 41 landoj

3.	La klaso, en kiu la fremdlingva instruado komenciĝas:	
	I	3 landoj
	II	1 lando
	III	2 landoj
	IV	2 landoj
	V	17 landoj
	VI	6 landoj
	VII	9 landoj
	—	1 landoj

Entute 41 landoj

Oni ne povis uzi la respondojn de Argentino, Aŭstralio kaj Irako. La respondoj ne venis el Suda Afriko, Madagaskaro, Meksikio, Rumanio kaj San Marino.

laŭ la instruplano de la baza lernejo a = finnlingvaj lernejoj
b = svedlingvaj lernejoj

Esperanto: lerneja eksperimento

raporto — analizo — konkludo (Edistudio, 1979)

Helmut Sonnabend

Resumo

La libro estas dividita en historio de la lerneja eksperimento, celoj de la eksperimento, planado de la eksperimento, organizado de la eksperimento, la Internacia lernejo, rezultoj de la eksperimento, konkludoj, la lingva materialo.

La lerneja aspekto (p. 7) priskribas la staton de Esperanto kiel lernejan fakon. Menciinde estus tie ĉi la vigla instrua aktiveco en lernejoj kaj universitatoj en Hungario, kompreneble per ŝtataj dekretoj ordigita.

Sub “Motivado de la eksperimento” (p. 10) estas rimarkigata la diversmaniera konsiderado de la fremdlingva instruado, kiu pli sekvas lingvopolitikajn pripensadojn ol motivigitajn pedagogiajn intencojn. La ĉapitro “Internaciaj konferencoj...” (p. 12) skizas plurajn konferencojn en Maribor, Internacia Domo Sonnenberg, en Antverpeno kaj Hannut, sed ankaŭ rezistoj de ŝtataj instancoj estas menciataj (p. 14), sed rimarkinda la positiva sinteno de la instruministro en Malsupra-sakcio.

La celoj (5) estas kunmetitaj sur la paĝoj 17-21 kaj motivigitaj: kiel lernefektivo kaj — ekonomio, la valoro por la propra gepatra lingvo, akcelado de la legolern — kaj ortografia evoluado, principa lingvoorientado, la kvina celo ampleksas la edukadon al “humaneca internaciismo”.

“Planado de la eksperimento” (p. 23-25) priskribas la elektadon kaj motivigadon por la lerneja ŝtupo (tie ĉi la 3-a kaj 4-a lernejoj). Tiel estis demandita, ĉu la infanoj estas kapablaj lerni fremdan lingvon, ĉu la infanoj almenaŭ alproprigos kelkajn elementoj de fremda lingvo aŭ tute ne kapablas lerni fremdan lingvon surbaze de lerneja koncepto.

La instruplano (p. 28) antaŭvidis entute 40 lecionoj kun 140 instruaj unuoj. La prezentata lingva materialo (p. 31) ampleksas 285 substantivojn, 108 verbojn, 51 adjektivojn, 22 adverbojn, 4 konjunkciojn kaj aliajn tipajn vortspecojn 77 frazmodelejn kaj 15 oftajn parolturnigojn. Interesa povus esti la per la gepatra lingvo jam kovrita vorttrezoro (p. 31). La meza procentaĵo estas tie ĉi 50,19 (indiko pri la pli facila lernebleco de Esperanto!)

La ĉapitro “Instruado” (p. 41 ĝis 103) priskribas metodologiajn kaj metodajn pripensadojn kaj implicas la enhavan temaron de instruaj unuoj. Lingvaj celoj estas komparataj kun tiuj de la angla lingvo (p. 43). Videbliĝas, ke Esperanto ne konas fonetikajn problemojn kiel ĉe la lernado de la angla lingvo.

“Planado kaj metodo de la instruado” (p. 46) informas pri la aplikado de metodologiaj ekkonoj, kiel ili ankaŭ estas modele (la divido de la jaro) p. 49 (eksplikitaj. Aparta signifo kaj atento estis — krom la komentarioj de frazaj strukturoj (p. 55) — dediĉitaj al lingvaj komparoj kiel “Minute, minute, minuut, minuto” Operativaj rilatoj donis la bazon por “lingvistika pensado”, la adjektivoj “blanka, wit” kondukas trans la Esperanto pri nomado “blanka” al la franca “blanc”.

Aparta atento estis donata la la praktika aplikado de Esperanto. Sub la ĉapitro “Kontaktoj inter lernejoj kaj infanoj” (p. 58) estas reproduktitaj pluraj leteroj kaj notadoj de la infanoj, kiuj povas esti komparataj kun la lingva evoluo.

Vasta spaco en la libro estas dediĉita al la testoj kaj iliaj rezultoj (p. 63 ĝis 103). Entute estas faritaj kvar testoj, kiuj devis certigi internacian komparon. Escepte de la grekaj infanoj la komparo montras signifan lernproksimon, tiel ke sendube “eŭropa lernado” en la lernejoj kondukus al samaj lernrezultoj. Unu demando inter aliaj estis tiu rilate al la lernintenseco aŭ — ekonomio. Unu testtasko tekstis: aranĝita je malgrandaj, mallongaj frazoj-traduku la Esperantotekston en vian lingvon. La sama teksto en angla lingvo estis antaŭmetita al la anglelernantaj infanoj.

Tiu ĉi speciala testdemando aktualiĝis en la ĉeflernejo ankaŭ eksperimenta lernejo — de Dollbergen. La grafikaĵo (p. 102) demonstras, ke la Esperanto-testklasoj plenumis la lingvan postulon je 80% — dujara instruperiodo —, dume la infanoj de la 7-a klaso post trijara instruado de la angla lingvo nur atingis 57%, sed unue la 8-a klasoj — kvar jaroj — egaliĝis je 76% proksimume al la rezulto de la 4-aj klasoj.

Komparo en koordinata sistemo montras, ke la infanoj kun Esperanto-instruado devus lerni 2,5 jarojn, por plenumi centprocente la lingvajn postulojn. Infanoj, lernantaj la anglan lingvon, bezonus por ĝi 5,3 jarojn, t. e., Esperanton oni povus lerni 2,12 foje pli rapide ol la anglan lingvon. Kvin-jara angla instruado signifus tempe por Esperanto nur 2,4 jarojn.

“La Internacia Lernejo” — priskribita sur la paĝoj 105-117 — demonstras okulfrape grandan malfacilon, kiu estas donita pere de la dekreto de la Malsupra-saksia kulturministro. Al elementlernejoj infanoj ne estas permesite iri kun iliaj instruistoj eksterlanden. Preskaŭ tiu ĉi dekreto estis malsukcesinta la tutan entreprenon! Finfine — per speciala dekreto la distrikta registaro donis la permeson, sed nur buŝe.

Sen precedenco estas la de ni aranĝita Internacia Lernejo. 148 infanoj formis kune kun siaj ok geinstruistoj la “eŭropan” lernejon. En ĉiu klaso troviĝis 18 aŭ 19 infanoj.

Instruate estis en la fakoj: matematiko, sporto, geografio, arto, muziko kaj Esperanto. Germanaj infanoj lernis kune kun francaj, belgaj, nederlandaj kaj jugoslavaj infanoj, kaj la komuna lingvo estis Esperanto!

La ĝenerala inspektoro de la belga lernejo, s-ro Andreanne, opiniis: “Esperanto kiel ek-lingvo ankaŭ taugas por tiuj, kiuj intencas lerni aliajn fremdajn lingvojn. Esperanto devus esti instruata jam en la elementa lernejo.”

“Finaj rezultoj de la eksperimento” (p. 119) ĝis 133 respondas al kvin celoj:

1. Lernefektiveco:

La en la 7-aj kaj 8-aj klasoj kaj eksperimentaj klasoj aplikitaj testoj eksplikis koefficienton de 2,12, kiu ĉi destinas la lernempon por la angla 1. Kaj Esperanto. La hipoteza aserto, ke Esperanto implicas altan lernefektivecon evidentiĝis kiel ĝusta.

2. Pli intensa lernado de la gepatra lingvo

La malnova pedagogia principo, ke unue komparoj ebligas ekkoni la demonstratan objekton, validas ankaŭ por lingvoj.

Lingvoj nur povas esti komparataj inter lingvoj. Multflankajn lingvokomparojn ebligis la Esperanto-instruado, tiel ke la infanoj gajnis gravajn enrigardojn en la propran lingvon, kiel vort-kaj fraztipoj, temposekvoj ktp.

3. La pozitiva influo de Esperanto al leg- kaj ortografiaj kapabloj

La ofta legado de Esperanto-tekstoj instigis la infanojn legi kompare nacilingvajn tekstojn, precipe la diversaj sonoj de la lingvoj stimulis ilin. Lernmalfortetaj gelernantoj profitis de la rektaj sonligigoj de Esperantovortoj. Ili ekkonis, kiel sonoj en ĝusta vicordo rezultis sencoplenajn vortojn.

4. La evoluado de lingva komprenemo rilate la lernadon de fremdaj lingvoj

Farite estas rimarkindaj esplorrezultoj de la FEOll-instituto Paderbon, (tabeloj kaj klarigoj sur la paĝoj 122 ĝis 125).

Ĝi esploris 43 lingveorientitajn gelernantojn. Ili estis komparitaj kun infanoj en samaj klasoj-entute 117 (ĉef-mezgradaj lernejoj, gimnazioj). Rezumitaj estis la klasifikadoj en geografio, germana lingvo, matematiko kaj angla lingvo.

La notaj diferencadoj donas interesajn klarigojn pri socialaj/talentrilatitaj tendencoj, kies kaŭzoj estas skizitaj sur p. 126, tamen montriĝis por ĉiuj lernejoj tipoj meza diferenco por la angla lingvo de 0,19. La esploroj estas daŭrigotaj.

5. Eŭropa edukado... (p. 126)

La celoj de la hodiaŭa fremdlingva instruado ensence de eŭropa integriĝo ne estas atingitaj, evidentiĝas nur malfortaj "anglaj" aŭ francaj rekontiĝoj. La parola komunikado estas malpli ol sufiĉa.

La lerneja eksperimento kun Esperanto tuj akiris "internacian klimon" inter la infanoj. Esperanto ne estis nur memutilo, sed dekomence la ponto por starigi rektajn kontaktojn.

Amaso da ekzemploj en la raporto pruvas tion. La sociala ĉirkaŭaĵo estis en sia dimensio pli grandigita kaj la sento al eŭropa kunligiteco estis konscie travivata.

6. Konkludoj kaj rekomendoj

Irado kaj studado de la lerneja eksperimento povas esti prijuĝata kiel pozitiva. La respondecaj kulturministroj estas petataj rekoni la rezultaton kiel ĝustan kaj ekzemplodonan. Ili estas plue petataj:

1. aprobi Esperanton kiel normalan lernejan fakon en elementaj klasoj (3. kaj 4. lerneja jaro);
2. aŭ rekomendi Esperanton kiel kursoferon apud aliaj fremdaj lingvoj;

3. aŭ agnoski la libervolan partoprenadon de gelernantoj en Esperantokursoj kiel pedagogie valoran;
4. kaj aprobi Esperanton por aliaj lernejoj ŝtupoj kaj — tipoj
5. postuli priskribadon de Esperanto kiel lernejan fakon kaj registri en lerneajn direktivojn;
6. permesi financon subvencion por la verkado de lernolibroj;
7. doni rekomendojn al lernejoj administracioj apogi Esperanton en la lernejoj fakte kaj morale;
8. ebligi lingvajn kursojn por instruistoj;
9. konsideri la enkodukon de Esperanto en universitatojn kiel lingvan fakon;
10. kunlige kun 9 aranĝi ekzamenojn por studentoj de la lingva fako Esperanto;
11. sugesti al aliaj landoj aŭ ŝtatoj la oficialan enkodukon de Esperanto en la lernejojn.

Rimarkoj pri la rilato inter la historio de la lingvo kaj de la socio.

Lucia Wald
Universitato de București (Rumanujo)

En la komunikaĵo oni evidentiĝas la rilatojn inter la lingvo kaj la socio, super ĉio koncerne la procezojn de unuiĝo kaj diversiĝo. Oni analizas la situacion de la komunikado dum la nuntempa epoko kaj precipe la dialektikan rilaton inter la nacieca kaj internacieca kategorioj sur la kampo de la lingvo.

Nuntempa vidpunkto koncerne la artefaritajn lingvojn.

Ioana Priotesa
Universitato de București (Rumanujo)

La aŭtorino proponas al si la revizion de vidpunkto esprimita antaŭ longe, koncerne la limojn de la esprimoŭvaj eblecoj de artefarita lingvo.

Montrinte, ke — por la semiotikaj sistemoj, kiuj estas konvenciacaj — la funkciebleco kaj ne ilia deveno havigas al ili socian specifon, kaj evidentiĝinte la kondiĉigon de la progreso de tia sistemo far la progreso de la socia vivo, le aŭtorino opinias.

ke la esprimeblecoj de konstruita lingvo, kiu per ĝia funkciebleco akiras socian karakteron, povas esti senlimaj, kiel senlimaj estas ankaŭ la bezonoj de la socia vivo, kiujn la konsiderata sistemo devas alfronti.

Emfazinte la rolon de la subjektivaj faktoroj en la evoluo de la sociaj fenomenoj, la aŭtorino opinias, ke per la aktivigo de tiuj faktoroj oni certigas la kondiĉon de la disvolviĝo de natura aŭ artefarita lingvo, laŭ la mezuro kaj en la ritmo de ĝia penetrado en diversajn fakojn de la socia vivo.

La konkludo de la komunikaĵo estas tio, ke ne la reduktigo de la uzada sfero de Esperanto, sed — male — ĝia disvastigo en kiel eble plej multaj kampoj de la socia vivo estas certa garantio pri la kresko de ĝiaj esprimopovo.

Rimarkoj pri la lingvaj baroj en la poezia traduko.

Constantin Dominte
Universitato de București

Reteninte nur la situacion, en kiu la traduskisto tre bone mastras la ambaŭ lingvojn — kiel la fonto-lingvon, tiel la celo-lingvon de la traduko —, la aŭtoro komentas, pere de du ekzemploj, la objektivajn lingvajn barojn en la poezia traduko. Temas pri baroj, kiuj devenas el tio nomita de Eŭgenio Coseriu: *Idioma kunteksto*.

Unu ekzemplo celas la semantikan flankon de la traduko, la alia — la fonetikan flankon.

Kvankam la konkludo de la esploro demonstras la nekompletan tradukeblecon, kaze de la konsideritaj specimenoj, tamen la fino de la komunikaĵo tekstas pri la neceso de almenaŭ aŭdaca provemo flanke de la tradukistoj koncerne la poezian verkon.

Loglan.

Julius Balbin
Essex Country College, Newark Jersey (Usono)

Antaŭ pli ol unu jaro, trafoliumante lingvistikajn revuojn en la biblioteko de Novjorka Universitato, mi surprize trafis la sekvan reklamon "*Loglan fine preta*". Ni pardonpetas tiujn, kiuj atendis 15 jarojn ĝis mi diros tion, sed nun mi povas

diri..."

La reklamo sciigis, ke vintre aperos du libroj: Loglan — la logika lingvo, Gramatiko kaj Ĝenerala enkonduko kaj dulingva Loglan-Angla kaj Angla-Loglan vortaroj, enhavantaj 16 mil Anglajn kaj 4 mil Loglan-vortojn. Kiel konscienca interlingvisto mi tuj poste mendis ambaŭ librojn plus la specimenon de intertempe aperinta *Loglanist*, dumonata revuo. Mi atendis ĉirkaŭ duonjaron por ricevi la menditaĵojn. Koincide mi trovis, ke Loglan estas listigita inter la 900 projektoj en la alfabeto listo, publikigita de unuiĝo internacia de interlingvistika servo en Amsterdam.

Post tiu enkonduko la prelego prezentos la lingvo-projekton, kritike analizos ĝin kaj konkludas per la vortoj de D. L. Armand:

"Surbaze de ĉiuj lingvoj ankoraŭ neniu kreis internacian lingvon. Principo de mezigo estas absolute absurda: se en la bazo estas du lingvoj, tiam por la aliaj ĉiuj vortoj estas fremdaj, se pli, tiam eĉ la popoloj de kiuj estas prenitaj la vortoj ne povas rekonigi la hibridojn."

Studo pri ebla influo de Jida kaj Hebrea lingvoj je Esperanto.

David Gold
Universitato de Haifa (Israelo)

Tiu ĉi studo montras, ke Zamenhof scivopis la jidan kaj hebrean tre bone, kaj ke ĉia studo pri la etimologiaj fontoj de Esperanto devas kalkuli je tiuj du lingvoj. Ja ĝi estas nur enkonduka studo, ĝi konsideras nur la plej elstarajn trajtojn de Esperanto. Jida aŭ hebrea influo certas, kiam unu el tiuj-ĉi lingvoj prezentas la unusolan modelon por iu Esperanto-formo (ekz. superjaro < jida *iberyor*). Jida aŭ hebrea influo estas pli malforta, sed ekzistas du eblaj modeloj (ekz. ĉu < pola *czy* kaj jida *tsi*; ekzisto de difina artikolo, sed foresto de nedifina artikolo en Esperanto < hebrea kaj pragreka.) Se ekzistas du aŭ tri eblaj modeloj el la lingvoj, kiujn Zamenhof parolis, jida aŭ hebrea almenaŭ fortigis la Esperantan formon.

Ĉi studo okupiĝas ankaŭ pri leksemoj de juda intereso (sinagogo, rabeno, ktp.) kaj pri kelkaj Zamenhofaj pseŭdonomoj.

Korektoj kaj aldonoj estos dankeme akceptataj.

La kohera strukturo de la Esperanto-gramatiko kaj minimala vortrezoro por la lingvo-orientiga instruado.

Hermann Behrmann
FEoLL, Paderborn (F.R.Germanujo)

La "lingvo-orientiga instruado" laŭ la Paderborna-Modelo estas Esperanto-instruado en la 3-a kaj 4-a element-lerneja jaroj. Poste — ekde la 5-a jaro — la lernantoj en FRG lernas aŭ la Anglan, aŭ (en kelkaj gimnazioj) la Latinan.

La hipotezo estas, ke tiu dua fremda lingvo estas pli facile lernebla, se oni antaŭe partoprenis la Esperanto-instruadon, sekve, la ĉefa celo de la Esperanto-instruado estas la perado de pasivaj lingvosocioj.

Kompreneble dum du jaroj oni ne povas instrui la "kompletan" lingvon. Ĝuste tial estas tre grava la preciza, science dokumentita elekto de la statistike pruvita plej bezonata baza lingva materialo.

La prelego prezentos la elekt-metodon kaj la finan rezulton: la necesan morfemotrezoron por la mimuma gramatiko de Esperanto.

La historio kaj nuna stato de interlingvistika kaj esperantologia universitata instruado kaj scienca esploro en Hungario.

István Szerdahelyi
Elte, Budapeŝt

Tezoj.

1. Ju pli izolita estas lingve iu nacio, des pli forte sentas la neces-bezonon de kontaktiga lingvo.
 - 1.1 La hungara lingvo funkcias en medio, ĉirkaŭata de neparencaj, tute "fremdaj" por ĝi lingvoj: slavaj, germana kaj romaninda.
 - 1.2 Mem en sia propra, ŝtate organizita etna medio nur post akraj politikaj bataloj kaj fortaj lingvo-novigaj operacioj sukcesis plenrajtigi la nacia

lingvo.

- 1.3 La hungara lingvopolitika kaj lingvonoviga movadoj estas la plej elokventaj historiaj ekzemploj pri la strikta adekvateco de ĉi-du flankoj de la aplikata lingvistiko.
2. La interlingvistikaj eksperimentoj elkreskas el la lingvopolitika kaj lingvonoviga movadoj: la unuaj lingvo-projektintoj (KALMÁR, RÉTHY, GÁTI, BOLYAI) partoprenis aktive ĉi-movadon. Ilia komuna ideologia grundo estas la klerismo.
 - 2.1 La plipostaj eksperimentoj (Velics, Menör) imitas la unuajn.
 - 2.2 Volapük — kies pioniroj estis BÁNFI, GEBAUR kaj la konata iranologo POZDER — elvokis akrajn polemikojn (influatajn ankaŭ de la tiam jam disvastiĝanta jun-gramatika koncepto) kaj igis kelkajn elstarajn lingvistojn eldiri siajn opiniojn (ekz. BALASSA).
3. Esperanto havis pli da sukceso. La fakto, ke ĝi aperis unue en universitata medio (BÁLINT G.) kaj la unuaj Esperantaj verkoj aperis en fake kompetenta medio (BSRABÁS Á.) certigis la seriozan bazon por ĝia disvastiĝo kaj enradikiĝo.
 - 3.1 Alveninte tra la provinco (Szekszárd; LENGYEL P.) al la ĉefurbo je la komenco de nia jarcento komenciĝis ĝia organizado, ekĝermis ĝia literaturo. Unu el la plej aktivaj kaj plej multflankaj ĝia adepto estis Géza BÁRCZI la pliposta fama hungarologo, pri kiu ni rememoras ankaŭ dum tiu ĉi nia kongreso.
 - 3.2 La unua mondmilito nur interrompis, sed ne ĉesigis la interlingvistikan movadon en Hungario. Reveninte el militkaptiteco Julio BAGHY kaj esperantiĝinte tuj post la mondmilito Kolomano KALOCSAY fondis kaj gvidis la t.n. Budapeŝtan Skolon.
 - 3.3 Tuj post la mondmilito, dum la Konsilantara Respubliko fondiĝis la unua en la historio scienca interlingvistika instituto en la kadroj de la Budapeŝta universitato: la Internacia Scienca Lingvoinstituto (04.07.1919) gvidata de la katedra profesoro pri Germanistiko SCHMIDT József.
4. En la periodo inter la du mondmilitoj la interlingvistikan movadon karakterizas la jenaj eventoj;
 - 4.1 Budapeŝto fariĝas la kultura centro de la tutmonda Esperanto-movado (Budapeŝta skolo; Literatura Mondo; aktiveco de A. CSEH);
 - 4.2 Elformiĝas forta esperantista-laborista movado, kiu, post la faŝistiĝo de la reganta politiko, fariĝas la kaŝorganizaĵo de la laborista-socialista kaj komunista movado;
 - 4.3 Sporade aperantaj verkoj kaj fondiĝantaj organizaĵoj (MARICH, D. SZILÁGY, BIRKÁS) pravas, ke la interlingva penso vivas.
5. Post la dua mondmilito, sed precipe post 1955 — reorganiziĝas la Esperanto-movado.

- 5.1 Post 1965 reaktivis profesoro BÁRCZI kaj sub lia influo elformiĝas kurento ĉiam pliforte akcentanta la neces-bezonon de la seriozaj sciencaj lingvistikaj esploroj.
- 5.2 Ekde septembro 1966 Esperanto lingvo kaj literaturo, resp. interlingvistiko fariĝas oficiala fako en la Budapeŝta Universitato.
- 5.3 La historion de la fondiĝo kaj dekjara funkciado de la fako entenas la Jubilea Jarlibro (Esperantologiaj Kajeroj n-ro 2).
6. Konkludoj kaj proponoj
- 6.1 La dekdu-jara funkciado de Esperanto-fako en la Universitato ELTE, Budapeŝto akumulis multajn pozitivajn spertojn. Estas domaĝe, ke ĝis nun nur en unusola universitato efektiviĝis tiaspeca instruado. Oni devas trovi la eblecojn:
 - 6.1.1 enkonduki Esperanton simil-forme ankaŭ en aliajn universitatojn;
 - 6.1.2 se tio ne eblas: almenaŭ instrui esperantologion kaj interlingvistikon oficiale en la kadroj de ĝenerale kaj aplikata lingvistiko;
 - 6.1.3 integri en la kadroj de ĝeneralaj kaj aplikataj lingvistikaj esploroj ankaŭ la interlingvistikan kaj esperantologiajn esplorojn.
- 6.2 Fondi internacian asocion de interlingvistoj kiu funkcii kiel membro-organizaĵo de la Internacia Asocio de Aplikata Lingvistiko. La antaŭpreparoj estu farataj dum la nuna kongreso, la fondo okazu en la sekva kongreso (Venezia, 1979).
- 6.3 Eldoni sciencajn periodaĵojn, aperontan dufoje jare kun la titolo: Periodica Interlingvistica.

Fruaj socialismaj konceptoj pri la lingva futuro de la homaro.

Árpád Rátkai
Szeged, Hungarujo

Pri la lingvo de la estonta komunisma socio okupiĝis kaj renesancaj, kaj 19-jarcentaj utopiistaj socialistoj. Precipe la teorio de Weitling enhavas atentindajn elementojn, sed eĉ tiu ne superas la nivelon de la utopioj.

La etburĝaj socialistoj, precipe la prudonistoj, la plemon de la Universala lingvo ligis al siaj sensciencaj sociaj konceptoj, al sia kongresa taktiko en la I-a Internacio, kaj al la problemoj de la franca ortografio. Kontraŭe al geniaj suspektoj de la utopiistoj, la etburĝaj socialistoj alportis nenion novan teorie al la problema de la lingva futuro, homara.

Marx kaj Engels eksplikis sian opinion nek por, nek kontraŭ la teorio de la Uni-

versala Lingvo. Ilia plej signifoplena kontribuo pri la homara lingvouzo troveblas ne la *Germana Ideologio*; "Ke la individuoj siaflanke komplete prenos sub sian kontrolon ankaŭ tiun produkton de sia specio, kompreniĝas per si mem." Do la socio forigos la klasikan, antagonisman, fremdiĝintan lingvouzan sistemon, kaj konscie kreos novan, direktatan, regatam, konvenan por la bezonoj internacian lingvouzan sistemon.

Etnaj problemoj kaj interlingvistiko.

Jaromír Jermář
Scienca Akademio, Praha, Ĉeĥoslovakujo

1. La etna lingvo estas unu el la ĉefaj kaj la plej stabilaj komponantoj de la etna komunumo, malgraŭ ke ĝi ne devas esti produkto de ĉi komunumo. La lingvo ne povas esti la unusola faktoro de la etnogenezo.
2. La etna kulturo estas rekte ligita kun la etno kiel etnogeneza faktoro kaj kiel produkto de la etna komunumo.
3. La etna kulturo ne estas reflekto kaj produkto de la etna lingvo, sed de la etna strukturo kaj de en kaj ekster-etnaj rilatoj.
4. La kulturo reflektas ne nur etnan komunumon, sed ankaŭ aliajn sociajn strukturojn kaj rilatojn. Tio signifas, ke la kulturo ekzistas kaj ene, kaj ekstere de la etna komunumo.
5. Ne la lingvo antaŭdestinas la kulturon, sed la kulturo influas la lingvon, la konkreta lingvo estas certgrade ankaŭ produkto kaj parto de la konkreta kulturo.
6. La ekzistantaj etnaj interlingvoj povas nek detrui la ekzistantan etnan kulturon, nek krei novan inter-etnan kulturon. La kreo de tia kulturo ne dependas de la interlingvo, sed de aliaj faktoroj.
7. La planita interlingvo same povas nek detrui la ekzistantan etnan kulturon, nek krei novan inter-etnan kulturon.
8. La etna interlingvo ne estas produkto de inter-etna, internacia socio kaj ties kulturo, sed estas ĉiam ligita kun la konkreta etna komunumo.
9. La planita interlingvo estas produkto de la konkreta historia socio kaj ties kulturo, nome de la inter-etna, internacia, trans- kaj super-nacia socio kaj ties internacia kulturo.
10. La kultura valoro de la lingvo, ankaŭ de la planlingvo ne dependas de la lingvo mem, sed de la kultur-socia medio, kiu ĝin uzas.

Kiel lecione instrui la ĉarman poemon “Panjo Anaso”?

redakcio

“Panjo Anaso” estas porinfana poemo el “Poezia Bukedo” por geknaboj de la mondo de Bertram Potte (Amo-Akademio).

Sendepende de ĉiuj teoriaj konsideroj same (eĉ pli) gravas la instruado de Esperanto mem. Sen ĝi ekstermiĝus nia lingvo.

Sendube estas instruistoj de iu establita fremdlingvo en pli bona situacio ol ni Esperanto-instruistoj. Tiuj studas laŭregule fremdajn lingvojn en altlernejoj kaj universitatoj, alproprigante ankaŭ didaktikon kaj metodikon de la fako. Pro manko de universitata Esperanto-lingvostudado ni devas meminitiative serĉi la taŭgajn vojojn, legi literaturon, eluzi niajn spertojn kaj interŝanĝi ilin.

Kiel kaj kiamaniere oni povus trakti la ĉarman poemon en Esperanto-studhoroj? Bonvolu priskribi viajn instruproponojn aŭ jam eble viajn spertojn kaj sendi la manuskripton al la redakcio. Tri interesaj kontribuajoj estos publikigitaj en IPR.

Panjo Anaso

Panjo Anaso decidis viziti
kun kvin anasidoj la lagon.
Ŝi kvakis: “Vi devas min bone imiti,
por ĝui senĝene la tagon!”

Panjo Anaso ekiris parade
trans korton, trans kampon, trans straton.
Laŭvice ŝin sekvis la kvin kamarade
kaj timis nek hundon, nek katon!

Baldaŭ ĉe l'rando de glata lageto
ŝi kvakis: “Mi volas instrui
pri naĝo, pri mango, kaj pri tualetoj
kaj kiel la akvon forskui!”

Kvakis la panjo: “La nuboj profetas,
ke bele pluvados site!
Rigardu! La paltojn la homoj surmetas
kaj time sin ŝirmas ombre!”

Panjo Anaso instruis tre lerte
kaj kvakis kun granda kontento,
Ĉar baldaŭ la kvino manovris tre sperte —
la celo de ĉies atento!

“Transen!” ŝi kvakis. “Min sekvu, mi petas!
La homoj aranĝas piknikon!
La knaboj, knabinoj kukerojn alĵetas
Kaj ofte sukplenan lumbrikon!”

“Ili la pecojn kun bruo naĝĉasis
kun multe da ridoj kaj kvakoj
kaj fine sin turnis kaj lace forlasis
la scenon kun plenaj stomakoj?”

“Marŝu linie! Vi devas ne puŝi!”
ŝi kvakis. “Min sekvu bontrove!
Ni hejmen rapidu! Jam tempo por kuŝi —
kaj morgaŭ ni iros denove!”

Preparkonferenco al nova serio de kunordigaj konferencoj en Maribor.

D-ro Mario Dazzini

De la 4a ĝis la 7a de Aprilo 1980 okazis en Maribor “Preparkonferenco al nova serio de kunordigaj konferencoj de ILEI en Maribor”. Partoprenis reprezentantoj de Slovenujo, Kroatujo, Italujo, Hungarujo; aliĝis sen partopreno Aŭstrujo. Jen la rezolucio:

“La preparkonferenco de reprezentantoj de la landaj Esperanto-Asocioj de Hungario, Italio, Kroatio, Slovenio kaj de Internacia Ligo de Esperantistaj

Instruistoj (ILEI),

- aŭskultinte la raportojn pri la nuntempaj kondiĉoj de fremdlingva instruado en dulingvaj ĉelimaj regionoj, notis grandan problemsimilecon kaj pozitivajn spertojn per dulingva edukado en najbaraj ĉelimaj lernejoj unuflanke kaj en lernejoj interne de la lando per instruado de la Internacia Lingvo aliflanke kaj,
- Konstatinte, ke la nuntempa situacio por la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj, post la sukcesaj eksperimentoj en du Eŭropaj regionoj ĝenerale favore evoluas (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio); (Belgio, Francio, Germanio, Grekio kaj Nederlando),
- celante praktike helpi al la sistema ordigado de la lingvo-instruado en lernejoj, sugestas:
 1. alvoki la respondecajn Ŝtatajn Edukinstancojn al tempe kaj metodike kunordigita reciproka agado en formo de interkonsultaj konferencoj, je kompetenta nivelo, surbaze de sciencaj rezultoj, atingitaj dum la eksperimentoj;
 2. alpreni celadon al “Kunordigita propedeŭtika instruado de la Internacia Lingvo, en sistema lernado de fremdaj lingvoj;
 3. kreadi novajn aktivecojn, celantajn la edukadon, pere de Internacia Lingvo, al kompreniĝo inter la popoloj.”

La konferenco rajtigas la organizan komitaton de la preparkonferenco en Maribor, kunordigi la konsultojn en la unuopaj landoj cele trovi la ŝtatan instancan, kiu pretos inviti la konferencon.

Sciigoj, raportoj.

New York teacherslearning Esperanto.

Post grandega antaŭlaboro de Esperantistoj, inkluzive AAIE-prezidanton John Lewine kaj Julius kaj Betty Manson, 15-semajna porinstruista Esperanto-kurso komenciĝis la 27an de septembro 1979, sub la aŭspicio de la Eduka Estraro de Novjork-urbo, kun d-ro Lewine kiel instruisto. La lernolibroj estis “A Home Study Course in Basic Esperanto” de Lewine-Fantini kaj “Elements of Esperanto: A Structural Approach” de Thomas Goodman. Dek kvin kursanoj aliĝis.

Unu el la kursanoj, S-ro Marr, ĵus fininstruis 5-sesian enkondukan Esperanto-kurson por infanoj kaj iliaj gepatroj sub la aŭspicio de la Asocio de Gepatroj (United Parents' Association).

La Novjorkaj edukaj instancoj nun konsideras eksperimenton kiu komenciĝus aŭtune 1980 ĉe la sesa klaso per Esperanto-kurso. Poste en la sepa klaso la samaj lernantoj studus fremdan lingvon (ekzemple la francan aŭ hispanan) kun similaj lernantoj kiuj ne studis Esperanton, por kompari la atingojn de la du grupoj.

Eduk-inklinoj en Usono.

Ĝis nun en Usono la ĉefa principo de la edukado estis ke la celo de publikaj lernejoj estas ebligi egalan edukadon okazon al ĉiuj infanoj kaj junuloj por servi liberan demokratian socion. Tamen, lastatempe aperas pli kaj pli da indikoj de *filozofia ŝanĝo*. Ekzemple:

Estas pli da programoj por mense talentaj lernantoj, dum la atingoj de “normaj” infanoj malaltiĝas.

En grandaj urboj kie troviĝas granda nombro da minoritatoj, pli kaj pli da mezlernejoj ne finstudas, dum programoj por helpi tiajn lernantojn malgrandiĝas.

Multaj edukistoj kaj kritikistoj ekfavoras pli malaltan aĝon por deviga lerneja partopreno, aŭ eĉ la tutan forigon de deviga edukado.

Tiaj emoj kombinas por formi du-vojan lernejan sistemon kiu fruaĝe *apartigas infanojn en du kategoriojn*: tiuj kiuj povas ceesti universitatojn kaj tiuj kiuj ricevos tre malmulte de edukado.

Krome pli kaj pli da riĉaj junuloj partoprenas privatajn aŭ elektitajn publikajn lernejojn, tiel apartigante lernantojn per ekonomio kaj raso.

Unu kaŭzo de tiu ŝanĝiĝo estas ke estonte la plej multaj okupoj ne postulos universitan edukadon.

(El artikolo “60s Gains Lost As Education Enters the '80s” de Sandy Close kaj Rasa Gustaitis, Pacific News Service, Jan. 17, 1980).

Internacia Feria Altlernejo en La Chaux-de-Fonds.

La somera kurssesio de Internacia Feria Altlernejo allogas per la varieco kaj alta nivelo de sia programo, la valoro de la docentoj, la beleco de la montara regiono Ĵuraso, kie situas la urbo La Chaux-de-Fonds je mil metroj super la mar-nivelo. La kursoj daŭras unu semajnon. Ili komenciĝas la dimanĉon per interkona vespero. La instruado okazas la matenon. Posttagmeze oni ekskursas aŭ ripozas.

Apud la esperanto-kursoj por progresantoj kaj komencantoj disvolviĝos kursoj pri pedagogio, Cseh-metodologio, psikologio, literaturo, lingvistiko, geografio. Instruos Eddy Borsboon, Nederlando; Claude Gacon; Jouko Lindstedt, Finnlando; Perla Martinelli, Claude Piron, Giorgio Silber kaj Walter Ŝelazni, Pollando. Ferii kleriĝante, jen do kion proponas al vi Internacia Feria Altlernejo ekde la mezo de la monato junio ĝis la fino de la monato aŭgusto. Interesatoj petu la detalan informilon al Kultura Centro Esperantista, pf 771, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando).

Venontaj aranĝoj de Kultura Centro Esperantista.

En majo, post la sabato 10a, kiun vi eble rezervos al la Ĝenerala Asembleo, vi nepre dezirus partopreni la Esperanto-Feston de la 31a de majo kaj 1a de junio. Aldona informilo kun aliĝilo alportas bazajn sciigojn pri tiu aranĝo. Detalan informilon ricevos la aliĝintoj.

Kun la aprila Monata Cirkulero vi ricevos detalan informilon pri la kurs-sesio de Internacia Feria Altlernejo. Sed vi jam sciuj la datojn de la antaŭviditaj kursoj, por povi rezervi en viaj ferioj semajnon por la Chaux-de-Fonds:

29an de junio — 4an de julio: Meza kurso de esperanto. Instruos Pérla Martinelli
6an de julio — 11an de julio: Meza kurso de esperanto. Instruos Giorgio Silfer

13an de julio — 18an de julio: Kion kaj kiel instrui en dekvespera esperanto-kurso.
Instruos Claude Gacond

21an — 26an de julio: Elementa kurso de esperanto. Instruos Claude Gacond
28an de julio — 2an de aŭgusto: Intimiĝo kun Ĵuraso. Instruos Claude Gacond
10an de aŭgusto — 15an de aŭgusto: Meza kurso de esperanto. Instruos Perla Martinelli. Kaj: Esperanto-literaturo. Instruos Giorgio Silfer

17an de aŭgusto — 22an de aŭgusto: La pola epopeo "Sinjoro Tadeo". Instruos Walter Ŝelazni

Verŝajne en la sekvanta semajno: kurso pri lingvistiko. Instruos Jouko Lindstedt
21-22-23ajn de septembro: Charles Baudoin kaj lia psikologia verko. Instruos Claude Piron

Esperanto-Klubo de Amikeco.

Ĉiu, kiu ekkonis Esperanton, bone scias, ke ĝi estas ne nur internacia lingvo, sed ankaŭ la ideo de amikeco kaj de reciproka helpado inter homoj de diversaj nacioj.

Por disvastigi tiun ĉi ideon, ni — geknaboj el Varsovio, el la urbo, kie naskiĝis Esperanto, kreis Internacian Esperanto-Klubon de Amikeco por lernejoj.

Ni elkore invitas vin al nia klubo!

Se vi estas knabo aŭ knabino inter 9- kaj 18-jaraĝa, vi povas fariĝi membro de nia klubo. Ankaŭ grupoj de geknaboj povas esti membroj.

Por personoj pli aĝaj ol 18 jaroj ni antaŭvidas la titolon: Amiko de la klubo.

La membreco estas senpaga. Oni devas nur plenumi jenajn kondiĉojn:

1. Sendi al la klubo plenigitan deklaron kaj du fotografaĵojn.
2. Skribi minimume kvarfoje en la jaro leterojn al la klubo.
3. Partopreni (se estos kondiĉoj) klubajn aranĝojn, konkursojn ktp.

Membroj de nia klubo ricevos kluban atestilon (Amikoj ankaŭ — sed specialan). Ĉiu Amiko kaj klubano ricevos niajn grupajn leterojn. Post la tria letero de vi, ni skribos vian nomon en la letera adresaro.

En viaj leteroj vi povas priskribi vian landon (urbon), ĝian historion, legendojn, kutimojn ktp. Via letero estos publikigata kun la aliaj kaj tiamaniere kreiĝos la grupa letero.

En estonteco vi ricevos ankaŭ la kluban insignon. Krom tio nia klubo intencas aranĝi ĉiujare internacian renkontiĝon.

Ni esperas, ke vi decidus esti membro (aŭ Amiko) de nia klubo, ke niaj kontaktoj estos por ni tre interesaj kaj utilaj, ke ni pli bone konatiĝos, ke ni fariĝos Veraj amikoj.

Korespondi deziras.

Studento 19-jara deziras korespondi kun tuta mondo. Jiri Šilc, Jankovice 166, CS-687 04 Traplice, *Ĉeĥoslovakujo*.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn Lembit Pukk, Pk. 22, SU-202020 Kohtla-Jarve 3, Estonio, *Sovetujo*.

Brazila 15-jara knabo deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiu lando. Wagner Arneiro, Praça Nações Unidas 94/1004, BR-27400 Barra Mansa, RJ.

Pluraj lernantoj deziras korespondi kun tuta mondo. E-klubo de Ikuno Altlernejo, Ŝindo I-552, Macubara-ŝi, *Japanio*.

Studentaj junuloj liceaj deziras korespondi kun gesamideanoj pri ĉiuj temoj. Tommasi Nicola, ĉe Instituto "Giberti", Via Bacillieri 1, I-37139 Verona, *Italujo*.

Gestudentoj deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Adreso: Universitato CEUB, Esperanto-Kurso, EQN-707/907, BR-70740 Brasilia (DF), *Brazilo*.

Ĉe mia lernejo laboras klubo de internacia amikeco. Ni respondas kun infanoj de aliaj landoj, ni lernas iliajn popolajn kantojn kaj dancojn. Nia urbo situas 100 km sudoriente de la ĉefurbo Praha. KMP, Věra Šramkova. Buttulova ul. 74, 58301 Chotěboř, *Ĉeĥoslovakujo*.

Multajn diversaĝajn gekorespondantojn por siaj multaj E-kursanoj (14-40-jaraĝaj) bezonas F. Navarro, Str. Calixto III-36, Valencia 8, *Hispanujo*.

Junulino deziras korespondi tutmonde pri ĉiu temo. Angele Varkauskas, a/d 257, SU-233000 Kaunas, Lietuva, *Sovetujo*.

Junulo deziras korespondi tutmonde pri ĉiu temo. Valerijus Rudzinskas, SU-234442 Stakiai, Lietuva, *Sovetujo*.

Junulo 18-jaraĝa deziras korespondi pri ĉiu temo kaj interŝanĝi gramofondiskojn kaj kasedojn kun pop-muziko. Jozef Kubanda, Pionierov 4, CS-036 Ol, Martin, Ĉeĥoslovakujo.

17-jara studentino deziras korespondi kun geknaboj el aliaj landoj. Nepra respondo. Rossana del Valle Alcócer, San Jose 1197, RA-3000 Santa Fé, *Argentino*.

Svedaj gekomencantoj 15-jaraj deziras korespondi tutmonde per bildkartoj. Skribu al: Esp-kurso, Kungshögskolan, S-341 00 Ljungby, *Svedujo*.

28 Esperanto-gelernantoj, precipe studentoj 18-30-jaraĝaj, deziras korespondi

kun tuta mondo pri ĉiu temo. Grupo Esperantista, Barancalle Barena 7, Bilbao 5, *Hispanujo*.

Geknaboj 11-jaraĝaj deziras interŝanĝi bildkartojn tutmonde. Esperantistaj Gelnantoj Instituto Rosmini, Via G. B. Piazzetta, I-20139 Milano, *Italujo*.

18-jarulino deziras korespondi kun tuta mondo, ŝatas bestojn, precipe hundojn, kaj estus feliĉa ricevi bildkartojn pri ĉiuj hund-rasoj: F-ino Rosa Aukstikalniene, J. Janonio 27, SU-235250 Pasvalys, Litovujo, *Sovetujo*.

Robert Alberg, 12 Kraus St., Tel Aviv, *Israelo*, serĉas korespondantojn por sia klaso de 11-13-jaraĝuloj kiuj lernas Esperanton en akcelita klaso.

Leteroj.

Estimata sinjoro Sonnabend,

“Leginte en IPR n-ro 2 1979 la artikolon pri la “In-problemoj”, mi konstatis ke ĝi estas nova pruvo de la supereco de Esperanto al naciaj lingvoj!

Kial? Nu, s-ro Maitzen prave konstatis ke en Esperanto, same kiel en la naciaj lingvoj la femalaj vortoj deriviĝas de la masklaj, do supereco de la viroj al la diskriminaciitaj virinoj! Fi!!

Li donas la ekzemplon de TEJO, kie oni tial prefere parolas pri la viroj kaj la inoj, por montri la seksan egalecon.

Sed ĝuste en TEJO estas multaj fraŭlinoj. Ĉu ili neniam konsciiĝis pri sia supereco al la derivitaj fraŭloj?

Maskla vorto kreita el femala vorto estas unikaĵo, kiu miascie ekzistas nur en Esperanto kaj ne en iu ajn nacia lingvo!”

Altestime

Elsa Otto

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	Jean Lehane, 2A Harms st., Toowomba, Queensland 4350
Aŭstrujo	Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno
Belgujo	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal
Brazilo	Elvira Fontes, C. P. 5888 São Paulo
Britujo	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH
Bulgarujo	Aleksiev, N.B., kv. Istok, blok I, vh II – Sofio
Danujo	Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnujo	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
F R Germanujo	Helmut Sonnabend – In den Horstwiesen 42 – 315 Peine
Grekujo	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506)
Hispanujo	Francisko Zaragoza Ruíz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo	Zsuzsa Barcsay, Bem Kp. 25/b, H-1011 Budapest
Islando	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Israelo	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv
Italujo	Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pĉk. 22-2883
Japanujo	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343
Jugoslavujo	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2:IV-32, YU-11000 Beograd
Luksemburgo	Robert Hoenecker, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette
Kolombujo	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
Koreujo	---
Malagasujo	Eugene Raveloson, B P 127, Antananarivo
Nederlando	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl
Nordameriko	John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266
Norvegujo	Elna Matland – Brekkev 50 – 4200 Sauda
Nov-Zelando	Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt
Polujo	Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa
Rumanujo	---
Sanmarino	Marina Michelotti, via 25 marzo 73, I-43031 Repubblica di San Marino
Sovetujo	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV
	Nikolaj Starodubčev, Poštrestante, SU-340047 Doneck
Sud-Afriko	Axel von Blottnitz – Marcolaan 8 – 1710 Florida Glen
Svedujo	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund
Svisujo	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz
Venezuelo	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

IZOLITAJ MEMBROJ

Ĉeĥoslovakujo	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram
Ĉinujo	Lu Chien-bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan
Germana D R	Till Dahlenburg, str. d. DSF 13, DDR-2722 Brühl
Irano	M. Saĝhafian, Širas ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19
Jemena PDR	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh Hospital, Khormaksar, Aden
Kubo	Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila
Singapuro	Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14
Zairujo	Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu

ESTRARO DE ILEI

prezidanto	rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F. R. Germanujo
vicprezidanto	direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapeŝt X, Hungarujo
sekretario	d-ro prof. Mario Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, Italujo
vicsekretario	prof. Francisko Zaragoza Ruíz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo
kasisto	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

KUNLABORANTAJ ORGANIZOJ

FIMEM	Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
UEA	Universala Esperanto-Asocio
Unesko	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

aperas trifoje jare

redaktas – Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, FRG

poŝtĝirkonto – Stockholm 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono – 20 svedaj kronoj

la abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita poŝtĝirkonto